

EKO 2023

**Pensu globe
Agu loke
Por la landa,
Fakaj kaj
Regiona
Laboro**

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komuniko



**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj,
Komercestoj, Blinduloj, Kolektantoj**

EKO 2023 / 22. Aprilo 20 2023

Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK


Internacia Kongresa Universitato en Torino

La 76-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU) kune kun la ligita Scienca Kafejo (SK) okazontaj dum la UK en Torino ofertas pli ol 20 prelegojn, preskaŭ same kiel la rekorda IKU en Lillo. Kiel en Montrealo, ankaŭ la IKU- kaj SK-prelegoj en Torino estos hibridaj kaj registritaj. Post pluraj magraj jaroj pro la pandemio, la ĉi-jara rikolto de la Internacia Kongresa Universitato denove superis dudekon da altkvalitaj proponoj, el kiuj la 5-persona IKU-komisiono (Sabine Fiedler, Jingen Wen, Hans Michael Maitzen, Jose Antonio Vergara kaj Amri Wandel) rekomendis naŭ por IKU (el ili 3 AIS-kursoj) kaj dek por Scienca Kafejo. La Estraro de UEA aprobis la proponon kaj tiuokaze akceptis sesan membron en la IKU-komisiono: prof. Grant Goodall, lingvisto en la universitato de Kalifornio en San Diego, Usono. Li anstataŭos Humphrey Tonkin kiu finis sian multjaran deĵoron en la IKU-komisiono antaŭ kelkaj jaroj. La distribuo de temoj: 4 pri fiziko, kemio aŭ astronomio, 3 pri lingvistiko, 3 pri Esperantologio, 2 pri literaturo. El la 8 ceteraj prelegoj 2 estas pri natursciencoj (ekologio kaj robotiko) kaj la aliaj pri sociaj sciencoj. Ĉiuj temoj kaj prelegantoj estas videblaj en la IKU-paĝo: <https://uea.org/teko/IKU/2023>. La plenaj tekstoj de ĉiuj prelegoj aperos en la tradicia IKU-libro, kiu estos havebla jam dum la 100-a Germana Esperanto-Kongreso fine de majo, kaj kompreneble en Torino.

Aldone okazos en Torino la disdono de Premio Pirlot, por la plej bonaj sciencaj libroj, artikoloj kaj prelegoj en la lastaj jaroj. Estos aljuĝataj ĝis tri premioj en ĉiu branĉo. La sumo de premioj estos ĉ. 500 Eŭroj. Proponojn bv. sendi al renato@esperanto.org ĝis la **fino de junio 2023**. Aliĝo al la 108-a UK Torino: <https://uk.esperanto.net/2023/>

IKU

Internacia
Kongresa
Universitato
en la UK



La 51-a Internacia Infana-Adoleskanta Kongreseto (IIK)

Lige kun la [108-a UK](#) en Torino okazos samtempe, de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023, ankaŭ la 51-a Internacia Infana Kongreseto (IIK) meze de la Parko La Mandria, apud Torino, Piemonto, Italio. Bonvenon viziti la retejon de IIK: iik.uea.org. La temo de la kongreseto estas "Sporto kaj Naturo".

La programo celas amuzi la infanojn kaj instigi ilin paroli en Esperanto en natura medio. Okazos ludoj kaj sporto, natursciencaj atelieroj kaj biciklado, manlaboroj kaj kantoj, ekskurso kaj certe Esperanto-kursoj. Vesperaj ludoj kaj interesaj vesperaj agadoj atendas la infanojn kaj adoleskantojn. Eksciu pli pri la [programo](#).

IIK bonvenigas partoprenantojn de diversaj aĝogrupoj, kiuj parolas Esperanton. infanoj kaj adoleskantoj estas la kutimaj IIK-partoprenantoj

- adoleskantoj ekde 17 jaroj kaj fluparolantaj povas fariĝi helpantoj
- infanoj ĝis 7 jaroj kutime bezonas gepatron/prizorganton/vartiston dum IIK.

En la [retejo](#) vi trovos pliajn informojn kaj la [aliĝilon](#), kie ĉiu infano povas indiki siajn ideojn por la programkontribuoj, kio certe eĉ pli riĉigos la eventon. Pri ajnaj demandoj bv. skribi al infana.kongreseto@gmail.com. Ni ankaŭ invitas vin subteni la partoprenon de infanoj/adoleskuloj el nepagipovaj landoj en la IIK [per mona donaco al la kongreseto](#) (uea.org/alighoj/donacoj UEA-kontoj: [Adoptaj Gepatroj](#) kaj [Infana kongreseto](#)). Ni kore dankas ĉiujn donacantojn.

Kurso inter kangaruoj

De: edukado.net <redaktanto@edukado.net>

la redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Vere Williams

Gvidantonomo: Vere Williams

Tipo: Nova movada kurso

Loko: Carole Park, Aŭstralio

Aldoninto: Vere

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: <https://edukado.net/kursejo?kid=27527>

Novrozo –okazo por festi kun Silkvojoj

Okaze de la internacia festo Novrozo en Irano, Turkio, Afganio, Uzbekio kaj aliaj landoj kaj regiono. Mi bondeziras al ĉiuj festantoj de Novrozo okazanta ekde la printempa ekvinokso



2023 la feliĉan Novrozon 2023 nome de IKEF kaj aliaj. Mi jam vizitis Iranon trifoje kaj Uzbekion kelkfoje. Mi konfesas ke la Novroza regiono estas unu el plej antikvaj civilizaciaj regionoj kunligitaj de Silkvojo tra Eŭrazia kontinento, kaj en la Novrozaj vizitindaj en la mondo. Mi esperas ke IKEF povos organizi turismajn karavanojn al la rozabela regiono kunlaborante kun lokaj ikefanoj kaj esperantistoj, ekzemple, ĉi-jare oktobro okazos la centrazia kongreso de

Esperanto en Taŝkento, Uzbekio, organizota de Uzbekia Esperanto-Asocio kaj uzbekia filio de IKEF, kaj nia IKEF planos sendi al la kongreso sian delegacion. Ĉu vi deziras aliĝi al nia delegacio? > Kontakto min,

Engjell Gusho, ngjellgusho@yahoo.fr

Fortalezo – ja la forto ne lezas

Ameriko. — La 2-an ĝis la 5-a de novembro 2023 en Fortalezo (Brazilo) samtempe okazos kvar kongresoj: 10a Tutamerika Kongreso de Esperanto, 57-a Brazila Kongreso de Esperanto, 41a Brazila Esperantista Junulara Kongreso, 8a Cearaa Kongreso de Esperanto. La kongresa temo estas “Homaj rajtoj, solidareco kaj memdetermino de popoloj”. Legu pli en la novaĵretejo La Ondo de Esperanto <https://sezonoj.ru/2023/03/ameriko-2/>

Esperanto en Brazila Libro-foiro

La Komisiono de UEA por Amerika Agado havas inter siaj taskoj en 2023 la informagadon al neesperantistoj en unu el la plej grandaj libro-foiroj de Latinameriko, la Internacia Libro-Bienalo de Rio-de-Ĵaneiro, kiu dum 10 tagoj altiras kutime pli ol 600 000 vizitantojn, ĉefe junulojn, lernejanojn, universitatanojn, legemulojn kaj interesatojn pri kulturo ĝenerale. La bienalo okazas en ĉiu nepara jaro ĉirkaŭ septembro. En la jaroj 2015 kaj 2017 la brazila Esperanto-movado sukcesis oficiale partopreni la eventon pere de institucia budo por disvastigi Esperanton.

La rajto havi tiun budon kostas al la institucioj ekde 4500 € (sumo por mendo de minimuma spaco kun bretoj por ekspoziciado de la libroj). En 2023 la trian fojon la Esperanto-movadon partoprenos la eventon, sub kunordigo de Asocio Esperantista de Rio-de-Ĵaneiro (AERJ) kaj Brazila Esperanto-Ligo (BEL). La unuan fojon UEA subtenas la agadon kaj pro tio al ĉiu 1 € donacita, UEA aldonos 2 € el propra buĝeto, tiel ke la organizantoj de la agado povu ricevi entute la sumon de 4500 €.

UEA do bonvenigas ankaŭ vin subteni per donaco. La organizantoj jam sukcesis akiri ĉ. 1600 € de brazilaj esperantistoj kaj la Amerika Komisiono petas nun la kontribuon de la internacia komunumo. Pro la triobligo de UEA, tio signifas, ke, se nun kolektiĝos pliaj 1000 €, la celo estos plene atingita. Vi povas sendi vian donacon al la UEA-konto [Informado](https://uea.org/alighoj/donacoj/informado) (<https://uea.org/alighoj/donacoj/informado>), aldonante kiel komenton: “Bienalo Rio”.

Tiu informagada projekto enkalkulas aktivulan trejnadon por trafa varbado, volontulan deĵoradon dum la evento kaj retan E-kurson por portugalo-parolantoj tuj post la evento. Krom UEA kaj BEL, ankaŭ partneras en tiu projekto Brazila Esperantista Junulara Organizo (BEJO) kaj la brazila eldonejo Temática, kiu publikigas librojn en kaj pri Esperanto. Informojn pri tiu agado oni trovas ĉe <https://www.aerj.org.br/bienal> kaj <https://mallonge.net/bienal2015>

Dudek famuloj serĉataj

Rezulte de la 3-a Recitado de Esperantaj Poemoj organizita de nia klubo en 2022 kelkaj pentristoj el arto-akademioj la provinco Liaoning bonorde pretas ole-pentri 20 gravajn figurojn en la monda Esperanto-movado (vidu n-ran 10 Esperanto, 2022, revuo de UEA) kaj jam finpentris la Esperanto-kreinton L.L. Zamenhof.

Nun ni esperas, ke vi povas helpi nin elekti (rekomendi) aliajn 19 figurojn. Rete bonvolu sendi al mi la nomon kaj foton de la figuroj elektitaj de vi antaŭ 20-a de aprilo, 2023. Antaŭdankon. Bv. respondi rekte al: ghemelurboj@sina.cn

Wu Guojiang, Prezidanto de Liaoning Esperanto-kultura Klubo, Ĉinio

Dana kunveno el 2022

La foto estis farita enŝipe.
La skandinavo kutimas
kunveni en ŝipoj por
komunaj kongresoj. Tipe la
ŝipo kursas inter
Kopenhago kaj Oslo,
tutnokta vojaĝo, kiu lasas
tempon por ekskursoj post
albordiĝo.



Ponta Renkontiĝo

Tio okazos en Frankfurto-Oder en la unua de majo, rande inter Germanio kaj
Pollando. Atingebla per rektaj trajnoj el Berlino. Informoj: [:ronaldschindler@web.de](mailto:ronaldschindler@web.de)

===== vortoj: 1175 =====

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komunikoj estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

<https://www.ilei.info/agado/EKO.php> por 2023 (ĝis 20.).

Aliaj Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>. La prezento estas ĝisdata ĝis majo **2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun enhavaj indikoj de post 2014.

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.